


Bulgara **ESPERANTISTO**

V - 19479/35 (1966)



1966

1

ENHAVO

	Paĝo
Ĉefartikolo. Por la popola feliĉo kaj prospero (N. Aleksiev)	1
Dimitris Vlahopoulos. Ni persistu	3
Sim. M. Simeonov. Vivaj en la morto	4
Nik. Pilev. Letero	4
At. Gaev. Venka batalo	4

JUNA ESPERANTISTO

Elizabeta Pallos. Pécs — urbo de la 22-a IJK de TEJO . .	5
* * * Niaj kunlaborantoj	6
Sergo Novik. Kanto de junaj esperantistoj	7

ORGANIZA VIVO

Vesela Ivanova, Blago Dimitrov, Cv. Todorov, S. Ŝijakov, K. Paspalev, Stojan Nikolov, J. Kazakov, Iv. Ŝivarov, Iv. Zahariev, P. Colov	
Simeon Hesapčiev. Por perfektigo	12
Adolf Holzhaus. Unuaj bulgaraj esperantistoj	14
Edvige Tantin. Italio—Como: Junulara Esperanto—renkontiĝo	16

Kovrilpaĝo: Televidstacio sur supro „Botev“ en

Balkan-montaro

Abonkotizo: jara — 1,40 levo, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro: por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 levoj por m²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

ENLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, R. Kongresi Permetit 7—II/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23, Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B—162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.



POR LA POPOLA FELIĈO KAJ PROSPERO

Nova Bulgario sin karakterizas precipe per sia politiko de konstruado kaj sociala progreso, de konstanta plialtigo de la materiala kaj kultura nivelo de la tuta popolo, kreado de kondiĉoj por ĉiam pli grandskala intensigo de ĝiaj fortoj kaj kreopovo, kaj antaŭ ĉio — per sia politiko de paco kaj konkordo inter la popoloj.

Malgraŭ la neordinare longa pasintjara senpluveco, la sukcesa realigo de la kvara kvinjarplano kreis kondiĉojn por nova, konsiderinda plialtigo de la salajroj de ĉiuj laboristoj, ŝtatoficistoj kaj de la popola inteligentularo, por plibonigo de la pensia asekurado de la vilaĝanoj, laborantaj en la kamparmastrumaj kooperativoj. La destinitaj 300 milionoj da levoj por la nuna kaj la sekvanta jaroj prezentas la plej grandan sumon, ĝis nun asignitan tiucele. Ĝi atestas pri la konstante kreskantaj ebloj de nia socialisma Patrolando. Tiu decido de la Partio kaj de la Registaro elokvente konfirmas, ke la evoluado de la popola ekonomio ĉe la socialismo ne estas celo por si mem, sed oni ĝin utiligas por sistema plibonigo de la materialaj, kulturaj kaj vivmanieraj kondiĉoj de ĉiuj tavoloj de nia socialisma socio. Tiu decido inspiras la laborulojn en urboj kaj vilaĝoj por dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la plua progreso de la ekonomio de Popola Respubliko Bulgario, ĉar ĉiu nova granda sukceso de la Patrolando garantias novajn eblojn por la plialtigo de la prospero kaj la kulturenivelo de ĝiaj civitanoj.

Inspirataj de la sama celo, la bulgaraj esperantistoj, partoprenantaj en diversaj sferoj de la laboro staras en la unuaj vicoj kaj kune kun siaj samlandanoj ili klopodas fervore por la plimultigo de la produktaĵoj, kiujn la bulgara popolo bezonas. Nun, antaŭ ĉiuj laboruloj de Socialisma Bulgario, kaj antaŭ la bulgaraj esperantistoj staras por praktika realigo en la vivo mem la taskoj desegnitaj de la kvina laŭvice kvinjarplano (1966—1970). Sendube, ankaŭ la grandiozajn taskojn, desegnitajn per la nova kvinjarplano, nia popolo plenumos eĉ dum malpli longa limtempo. Tiun sukceson garantias la grandega sperto, amasigita en la laŭplana konstruado de la ekonomio kaj la kulturo de Nova Bulgario. Ĉe la pridiskutado de la taskoj por la unua jaro de la kvina kvinjarplano la laborkolektivoj de entreprenoj, kamparmastrumoj, esplor-sciencaj institutoj k. a. malkovras novajn rezervojn por superplenumo de la laŭplanaj postuloj; por efektivigo de pli grandkvanta, pli altkvalita produktado kun malpli alta fabrikcosto; por certigo de pli granda kvanto da pura produktado. Ĉar nur la bonkvalitaj, sendifektaj produktaĵoj estas la firma bazo de la nacia enspezo de la lando kaj la sola reala fundamento por senhalta plibonigo de la popola prospero. La proponita por tutpopola pridiskutado nova sistemo de planado kaj direk-

tado de l'popola ekonomio malkovras antaŭ la laborkolektivoj suplementajn, ne ekzistantajn ĝis nun eblojn por krea maniero de solvado de ekonomiaj problemoj. Kaj la ĝisnuna prov-aplikado de tiu sistemo en centoj da entreprenojoj pruvis ĝiajn avantaĝojn por sukcesa plenumo de la ekonomiaj taskoj.

La mobilizado de la fortoj de ĉiuj laboristoj, vilaĝanoj kaj de la popola inteligentularo havos kiel rezulton novajn laborheraĵojn por la plibonigo de la popola vivmaniero. Tiurilate gravan rolon ludos ankaŭ la balotado por elekto de deputitoj, komunumaj kaj distriktaj konsilantoj kaj popolaj juĝistoj, kiu okazos je la fino de februaro ĉi-jare.

Vasta kaj intensa estas la aktiveco de nia loĝantaro en urboj kaj vilaĝoj en la sferoj de la soci-politika vivo kaj la produktado dum la periodo antaŭ la balotado. Ĝi kontribuos por ankoraŭ pli fortika unuiĝo de la popolaj fortoj ĉirkaŭ la desegnita de la Oka Kongreso de BKP programo por la finkonstruo de la komunisma socio en nia lando. Tiu grandioza perspektivo, kiu metos nian landon sur unu el la ĉefaj lokoj en la mondo, laŭ alteco de la vivnivelo de la loĝantaro, estas efektivigata iom post iom antaŭ niaj okuloj. Ni jam gustumas la fruktojn de la unuaj praktikaj rezultoj. Tiu perspektivo pli kaj pli profunde penetras ĉiujn fibrojn de la konscio de la popolamasoj. Kaj tio ja estas garantio por ĝia realigo, ĉar la plej decidiga kaj plej grava produktadforto — tio estas la organizitaj kaj inspiritaj de la Partio por grandaj heredaĵoj vastaj popoltavoloj el ĉiuj uzinoj, kooperativigitaj kamparmastrumoj kaj sciencaj institutoj.

Estas patriotisma devo de ĉiu esperantista societo kaj de ĉiu esperantisto klarigi al ĉiuj membroj, al ĉiuj najbaroj la gravegan signifon de la balotado por konsistigo de ankoraŭ pli aktivaj kaj kreopovaj organoj de la popola regpotenco, kiuj estu kapablaj organizi la fortojn kaj la eblojn de la tuta nacio, por solvo de la grandiozaj taskoj de la konstruado, kaj ankaŭ por pli efika defendo de la paco sur la Balkanoj kaj en la tuta mondo.

Dum la plenumado de tiuj tutpopolaj taskoj, la bulgaraj esperantistoj havas ankaŭ alian gravan interne-organizan taskon: regule okazigi la raportajn jarkunvenojn de la societoj. Dum tiuj jarkunvenoj ili raportos pri siaj sukcesoj kaj mankoj; ili skizos iniciatojn por ĉiufanka kaj kompleta plibonigo de sia labormaniero kaj elektos novajn, ankoraŭ pli entuziasmiĝintajn kaj spertajn estrarojn, por garantii novajn sukcesojn en la diversspeca poresperanta agado en la respektiva loĝloko, entrepreno, lernejo,

Dum la kuranta jaro 1966, nia ĉefa tasko estas realigi per la fortoj de la junularo la grandajn iniciatojn, kiaj estas: la Sepa Gejunulara Festivalo en Loveĉ, la Kongreso de STELO en Ruse, nia partopreno en la Universala Kongreso kaj en la Kvara Konferenco de MEM en Budapeŝto.

Niaj gejunuloj devas en la nunjara vintro okazigi sur Vitoŝa-monto Vintran Ferio-semajnon. Ili devas ankaŭ prepari sin por la Kongreso de TEJO en Pecs, kaj en la nunjara somero — de la 1-a ĝis la 20-a de julio, ili devas organizi en urbo Vetiko Târnovo la labormanieron de la Gejunulara Esperantista Nacia Laborbrigado.

Konekse kun tiuj kaj iuj aliaj taskoj, la bulgara esperantista movado devas aperi post la balotkampanjo ankoraŭ pli fortikiĝinta, kun plialtigita politika konscio kaj disciplino, por esti kapabla plenumi ĉiujn siajn taskojn rilate al la postuloj, kiujn la fulmrapide evoluanta vivo metas antaŭ la bulgarajn esperantistojn.

NI PERSISTU

Kiam Galileo asertis, ke la tero rotacias, oni konsideris lin herezulo kaj devigis lin publike rezigni sian teorion. Hodiaŭ oni instruas en ĉiu lernejo tiun saman teorion.

Kiam Steffenson proponis konstrui lokomotivon, oni nomis lin fantaziulo kaj gravmienaj profesoroj kun kompato klarigis al li, ke neniam lia ideo estos realigebla. La vaporo ne havus sufiĉan energion por funkciigi la maŝinon, la radoj glitus sur la feraj reloj. Nuntempe la fervojoj trakuras la landojn.

Kiam oni unuafoje proponis fari **ferajn ŝipojn**, la fakuloj svenis pro laŭta ridego kaj asertis, ke tiaj konstruaĵoj tuj alfundiĝus. Hodiaŭ oni ne plu konstruas lignajn ŝipojn.

Kiam oni komencis paroli pri **flugmaŝinoj**, la kompetentuloj nomis la pionirojn stultuloj kaj klarigis, ke eĉ infaneto komprenas, ke io pli peza ol aero ne eblas flugi. Hodiaŭ la aero-

planoj mastras la ĉielon.

Kiam la unuaj propagandistoj paroladis pri **demokrateco, ĝenerala voĉdonrajto kaj okhora labortago**, la konservativuloj disŝiris siajn vestojn kaj ĝemplendis pri ŝanĝigo de la moroj, venonta anarkio kaj pereco de la civilizacio. Hodiaŭ ĉiuj tiuj ideoj jam delonge efektiviĝis. Tamen la civilizacio ne pereis.

Kiam la unuaj kuraĝuloj kaj progresemuloj pene laboris kaj strebis por donaci al la homaro siajn inventojn kaj bonfarojn, kiaj estas la **aŭtomobilo, la skribmaŝino, la presarto, la Ruĝa Kruco, la kinematografio, la stenografio** k. t. p., ili unue rikoltis nur sarkasmon, mokon, malhelpon. Sed ili **persistis** . . . kaj venkis!!!

Hodiaŭ la mondo ankoraŭ ne ĉie akceptas nian internacian lingvon. **Se ni persistos, ankaŭ Esperanto morgaŭ venkos.**

Dimitris Vlahopoulos

BELARTAJ KONKURSOJ 1966

U. E. A. denove invitas ĉiujn siajn membrojn kaj membrojn de la 51-a Universala Kongreso en Budapeŝto partopreni la Belartan Konkurson. La kompleta reviziita regularo de la Konkurso aperis en la Jarlibro de U. E. A. 1965, Unua Parto, sur la paĝoj 132-4. Estas tre konsilinde atente tralegi la regularon antaŭ forsendo de la konkursa materialo.

Kiel en la lastaj jaroj la ĉijaraj branĉoj estas jenaj:

Originala poezio

Tradukita poezio

Originala prozo

Originala drameto (por scenejo, televido aŭ radio)

Ĉiu konkursanto povas partopreni nur per tri konkursaĵoj (tajpitaj en 4 ekzempleroj) en ĉiu branĉo, antaŭe ne aperintaj en presformo.

Konkursaĵojn kun la aldonajoj laŭ la regularo oni sendu al la Sekretario de la Belarta Konkurso s-ino Emilija Lapenna, Nova Ves 32, ZAGREB, Jugoslavio. La limdato por ricevo de la konkursaĵoj estas la 31-a de marto 1966.

En la kancelario de BEA estas ricevita letero de s-ro Leonid Romanov, sekretario de la komitato por celebrado de la Tago de UNO, kun jena enhavo:

„Karaj Sinjoroj,

Mi petas vin akcepti mian sinceran dankon pro la ricevita ne de longe via afabla letero okaze de la 20-a datreveno de UNO“.

VIVAJ EN LA MORTO

Ĉe tombomonumento de partizanoj
de Simeon M. Simeonov

Jen kuŝas ili en la tera sino,
falinte por viv' nova sur la Ter'—
pereis ĉiuj en la luktkulmino
por la liber' popola kaj prosper'.

Batalis ili per gigantaj fortoj
sur kampoj kaj sur ĉiu alta mont';
militis kontraŭ la faŝistaj hordoj,
por doni pacon al la tuta mond'.

Kaj ne timante la teruran morton,
luktante ĉiam kun kuraĝa kor',
plenfidis ili la popolan forton,
fidelaj restis ĝis la lasta hor'.

Triumfis baldaŭ la patruj' libera—
la socialismon kreas ĝi kun flam'
kaj estas viva monumento vera
de paca kunekzisto, justo, am'.

Nun kuŝas la luktintoj por libero
en sia dormo paca, sen dolor'—
adeptoj de la novo kaj l' espero.
Al ili estu glor', eterna glor'!

(Premiita en la Literatura konkurso)

10. 8. 1964.

LETERO

de Nikola Pilev

Amiko kara de Hanojo,
letero via min atingis
kaj mi komprenis, ke en vojo
vi skribis ĝin sur ponardingo.

El la linioj kelkaj kurbaj
elŝprucas amo kaj kolero,
ke venas konkerantoj murda
mortpafi vian ja liberon.

Ŝtalbirdoj la kolombojn pelas
de via firmamento pompa.
Kaj vi ekiras sub la steloj
por revenigi la kolombojn.

Amiko kara de Hanojo,
ni scias ke l' murdistoj fiaj
per kugloj, bomboj kaj malĝojo
por lukt' ne rompos volon vian.
(Premiita en la Literatura konkurso)

VENKA BATALO

de At. Gaev

Al la sudvjetnamaj partizanoj

Kun ĝoj' senlime granda
leteron vian mi
ricevis el la lando
de l' peza, sklava viv'.

Kaj per tremanta mano
mi ĝin malfermis tuj,
ekscii pri l' slogano
por venko de l' patruj'.

Kaj de rakonto via
elŝprucas nur impet'—
kaj sturmo de radioj
al la sklaviga ret'.

Ĉar per batal' persista,
vi fratoj, venkos nun
la bandon de rabistoj—
simbolo de mallum'.

JUNA ESPERANTISTO



PECS — URBO DE LA 22-a IJK DE TEJO

Elizabeta Pallos

Post 4-hora vojaĝo Budapeŝt — Pécs tra la vagonfenestro aperas la verdaĵo de la monto „Jakab“, ĉe kies piedo novaj konstruaĵoj kolorigas la horizonton. Proksimiĝas la dumiljara urbo Pécs, sed unue vidiĝas la moderna, nova kvartalo, kie troviĝas ankaŭ la impona restoracio „Olimpia“ — loko de la Interkona vespero. Higienaj, komfortaj loĝejoj en modernaj domoj; larĝaj, rektaj stratoj; floraj parkoj prezentas la novan socialisman urboparton.

La malnova urbo montriĝas en sia mirinde bela situo sur la deklivoj de la monto „Mišina“. De malproksime kaptas rian atenton la kvar turoj de la katedralo. Ne povas eviti nian atenton la verda kupolo de la iama turka moskeo, inter domoj kaj dometoj, kiuj sin alkroĉas ĉiam pli kaj pli super sur la montdeklivo, — ĝis ilin anstataŭas la verda de la vinbergardenoj, arbaroj. Sur la montpinto salutas la alvenantojn belvedero kaj turo de la televidstacio.

Oni konstatas sen troigo, ke tiu ĉi panoramo ĉe la piedo de la montaro Mecsek kaptas ĉies simpatian. Franca ĵurnalisto skribas pri Pécs: „Ĝi apartenas al la plej belaj regionoj de la

mondo.“ Same opiniis ĉiuj, kiuj dum du mil jaroj spertis la ravan pejzaĝon.

Dum la romia regado la urbo nomigis Sopianae; la tiutempaj verkaĵoj mencias laŭde pri ĝi.

Ĉiukaze ni ne povas konatigi vin kun ĉiuj belaĵoj de la urbo. Tamen ni povas montri al la kara gasto kelkajn karakterizajn interesaĵojn. Vid-al-vido al la stacidomo staras la statuo de Nikolao Zsolnai, kiu fondis la mondfaman majolik-fabrikon. Tutan muzeon plenigas la artobjektoj de la fabriko, nepre vizitinda bela kolektaĵo. La ĉarmoj de la delikataj figuroj, la mirinda kolorskalo certe gajnos la plaĉon de ĉiuj vi.

En la centro de la urbo ektuŝas nin etoso de la diversaj jarcentoj. Ĉi tie precipe la temploj donas karakterizan trajton al urbo, kies malnova epiteto estas „hungara Romo“. Ankaŭ sub la tero ni trovas ejon de la religia kulto. La malkovritaj tombokameroj de la romia prakristana tombejo estas unikaj maloftaĵoj norde de la italaj Alpoj. Antaŭ la katedralo ni povas eniri en subterajn pentrajornamitajn kriptojn. La freskoj originas el la 4-a jarcento.

Super tiuj subteraj relikvejoj impone leviĝas la kvartura katedralo. En la jaro 1009 la unua hungara reĝo Sankta Stefano fondis ĉi tie episkopejon kaj tiam komenciĝis ankaŭ la konstruado de la katedralo. Post plurfoja rekonstruado ĝi ekhavis la nunan romanstilan formon, similan al ĝia unua aspekto. Por ĝui la belecon de la katedralo ne ŝparu vian tempon. Nepre rigardu la katedralon — por fotoamatoroj ni rekomendas — de sude kun la parko. De tie vi ĝuos la harmonian aperon de la preĝejo en kadro mirinde bela.

Post kelkaj paŝoj de la katedralo ni atingas la subĉielan teatron, kie okazos la solenaĵoj dum la Kongreso. La kolegioj, kiuj akceptos la kongresanojn, troviĝas plejparte proksime al la subĉiela teatro. Du studentaj hej-

moj situas apud la konstruaĵo de la Universitato de Pécs, fondita en 1367, kronologie la kvina en Eŭropo. Nun ĝi havas medicinan kaj juran fakultatojn. En la ĉefplaco „Széchenyi“ staras la kupolhava, plej granda estinta turka moskeo en Hungario. Ĝi estas nun katolika preĝejo kaj havas belajn freskojn, pentritajn de la fama pentristo de Pécs — malnova esperantisto — Ernesto Gebauer.

De sur monto ni rigardos la teritorion de karbminejoj, kiu donas la plej bonkvalitan nigran karbon de la lando.

Kore, gastame atendas la partoprenantojn de la 22-a IJK la loĝantaro de la urbo Pécs. LKK esperas, ke vi ricevos en unu loko ĉion, kion vi deziras kaj gardos la memoron pri Pécs inter viaj plej belaj travivaĵoj!

PROVIZORA PROGRAMO

Interkona vespero; solena malfermo en la subĉiela teatro; marŝo tra la urbo kun lampionoj; ekskurso al la placo Tettye; oficiala akcepto; teatra vespero; renkonto kun la loka junularo; tuttaga ekskurso al la banloko „Harkány“; vizito al la fortikaĵo „Siklós“; balet-ensembla prezentado; futbalmaĉo; internacia belarta vespero; ekskurso al la monto „Misina“; Ĝenerala kunveno de TEJO; adiaŭa balo kun elekto de „Miss Esperanto“.

INTERNACIA STUDENTA SEMINARIO EN TORUN (POLLANDO)

Ĝi okazos inter 14—16 de aprilo, 1966 en la bela norda urbo de Pollando — Torun. **Celoj:** resumo de la studenta agado dum la JJK, partopreno en la celebrado „1000 jarojn Pola Ŝtato“, prezentado de novaj disertacioj de studentoj-esperantistoj, prilaboro de agadmetodoj de studentaj sciencaj rondoj enkadre de STELO.

En la Seminario povas partopreni ĉiuj interesiĝantoj. **Kotizo:** ĝis 31. III. 1966, por membroj de STELO, 100

steloj (150 forintoj), por aliaj: 125 steloj (200 forintoj).

La kotizo inkluzivas 4 tranoktadojn, 12 manĝaĵojn, programajn elspezojn. Post la Seminario okazos aŭtobusa ekskurso — kotizo 50 steloj.

Petu pliajn informojn de: Dimitr Stratiev, Ruse, Komsomolska 8, Bulgario.

NIAJ KUNLABORANTOJ

Anna Lukaszewska — Pollando

Ĉarma esperantistino, kiu konas Esperanton de post 1963 kaj jam perfekte posedas ĝin. En Varsovia Filio de PEA maturiĝas ŝia emo al la Internacia Lingvo, komenciĝas tie unuaj paŝoj en la Movado. Sekvas eksterlandaj vojaĝoj kaj partoprenoj en E-aranĝoj, riĉa korespondado.

Anna Lukaszewska estas studentino pri juro, kun kromaj interesoj pri politiko, filozofio, moderna muziko... Post la Dua Internacia Seminario kaj Feriosemajno de BEJ en Primorsko (1964) ŝi fariĝis kunlaborantino al „Juna Esperantisto“ kaj BEJ. Menciindaj estas ŝia modesteco kaj riĉa naturdevena kulturo.

BEJ kore salutas ŝin kaj deziras efikan kunlaboradon!

STELO — ESTRARO

Prezidanto — Jordan Kazakov (Bulgario)

Vicprez. — Gabriel Ivanov (Pollando)

Ĝen. Sekretario — Adrian Boldan

Kasistino — Clonde Neurmout (Francio)

Redaktorino — Anna Salamon (Hungario)

Sciencaj aferoj — Andrzej Grabowski (Pollando)

Kulturaj aferoj — Roberto Groenvelt (Nederlando)





Kanto de junaj esperantistoj

Ritmo de marŝo.

VORTOJ KAJ MUZIKO DE SERĜO NOVİK.

1. EN MOND' EK- ZI- STAS MUL-TAJ LINGVOJ HO - MAJ,

1. KAJ STA - RAS U - NU NE EN LA-STA RAND' -, KUN ĜI LI-

1. BE - RAJ ES-TAS ĈI-UJ VO - JOJ, A - MI- KOJ DE L' TER-

1. GLOB' EN AJ- NA LAND' -. 1. KUN ĜI LI - BE- RAJ ES-TAS ĈI - UJ

1. VO - JOJ - , A - MI- KOJ DE L' TER- GLOB' EN AJ- NA LAND' -. 1. 2. 3.

4. ĈI - U SER-VU PEC' - !

Ekzistas multaj lingvoj en la mondo,
sed nur al unu ligas nin la kor'.
Ĉi bonvenigas al amika rondo,
de miskompren' nuligas murojn for.

Kun ĝi ni pa'os tra la tero tuta,
salutos kontinentojn per leter',
ĉar jam ne plu ni estas kvazaŭ mutaj,
ni ĉie sentas nin en he'ma sfer'.

Ĝi estas nia iingvo Esperanto,
al la gepatra lingvo kara frat',
armilo de pacama batalanto,
kontraŭ militeksplodo, atombat'.

Per juna kor' soifas ni la pacon,
kunvivon aman inter ĉiu hom'.
Ni servopretas nian idealon,
por regu Am' kaj Pac' en ĉiu dom'.

El rusa lingvo tradukis

Ludmila Jevsejeva

SCIIGOJ

+ La VII-a Festivalo de Bulgara Esperanto-Junularo okazos en Loveĉ inter la 2-a kaj 4-a de aprilo, 1966. Pliaj informoj — en n-ro 2 de „JE“ kaj la dissendita speciala cirkulero de BEJ. Pri partopreno el eksterlando skribu al BEJ, p. k, 587, Sofio, Bulgario.

+ Laŭ propono de STELO-Estraro Bulgara Esperanto-Junularo faris esplorojn kaj prezentis raporton al BEA pri organizo de la IV-a STELO-Semajno (jam Unua STELO-kongreso) en 1966 en Bulgario. En Ruse provizore agas SEK por komencaj laboroj. Post kelka tempo estos anoncitaj la detalaĵoj pri la Kongreso kaj aperos la Unua Oficiala Bulteno.

Do, post la 22-a TEJO-Kongreso en Hungario la tutmondan E-junularon allogas la interesoplena Unua Kongreso de STELO en Ruse.

AGRABLA KAJ UTILA

La 10-an de septembro. Dimanĉon frumatene. La urbo vekiga. Granda parto de la laboruloj forlasas siajn domojn kaj direktigas je ripozo al la monto Vitoŝa.

Freŝa aero, puraj stratoj, belaj ĝardenoj. De malproksime oni komencas ĝoji je la monto, kies pintoj ruĝiĝas ĉe la unua kareso de la suno.

Antaŭ la aŭtobusa haltejo estas formikaro da homoj. Dank' al la multaj veturiloj la placo baldaŭ senbruiĝas.

Kie estas niaj geesperantistoj? Hodiaŭ ni kunligos la agrablan kun la utila — ni hakos kaj arigos lignon por la vintra sezono, truojn ni fosos por pinarbetoj. Nia montodomo devas esti la plej bela kaj bone ordigita ĉiurilate. Ĉu maleblas ne havi vizitojn?

En la aŭtobuso al la hotelo-restoracio „Kopitoto“ (la hufo) mi renkontis kelkajn niajn gesamideanojn.

La veturilo malrapide ekiris kaj lasis malproksime post si la urbon.

La bildoj senĉese ŝanĝiĝas kaj oni ne povas pritaksi, kiu estas pli bela. La nuancantaj folioj de l' arboj donas fabelan fonon al tiuj vivantaj bildoj.

Ni proksimiĝas al la lasta haltejo „Kopitoto“. La aŭtobuso malrapide haltas. Antaŭ ni aperas mirinda panoramo. Facila nebulo malheligis la urbon kaj videbliĝas nur la orumitaj kupoloj de la templomonumento „Aleksandr Nevski“ kaj la grandaj kamentuboj de la fabrikoj kaj uzinoj.

Antaŭ la restoracio „Kopitoto“, kiel ĉiam, estas vigle.

En la naturo ĉiu sin sentas feliĉa.

La vojo al nia montodomo „Esperanto“ pasas tra pitoreskaj regionoj. Belegaj kampoj, arĝentaj riveretoj susuras sub la diverskoloraj falintaj folioj. Oni sentas la spiron de l'aŭtuno.

Sur la lazura fono de l' ĉielo kiel blankaj cignoj naĝas multnombraj nuboj.

Mirinde belaj ruĝaj fruktoj! Jes, tio estas la belforma viburno, prikantita multfoje de niaj poetoj. La blankaj betuloj, la pinoj, la avelaj arbustaroj superŝutitaj de fruktoj inter ili la mildaj montaraj floroj, ĉion tiel donis al ni la naturo, kaj ŝajnas, ke per la mano de iu granda pentristo estas farita tiu ĉarma bildo.

Ĉu nur tio ne sufiĉas por ravi, por ĝuigi? Ne, tio ne estas ĉio. Ĉi tie la homa mano tre sukcese kompletigis, kaj kie estas necese eĉ korektis la naturon, por ke ĉiu povu trovi tion, kion li serĉas.

La multaj montodomoj kokete konstruitaj, la restoracioj ĉe ili proponas agrablan gastigadon kun bongusta manĝaĵo al tiuj, kiuj ne deziras porti dorssakojn de Sofio. La butikoj, la

magazenetoj, la trinkejoj, la varmaj kradrostaĵoj kies bonodoro tentas eĉ niajn gevegetaranojn, faciligas la halton en la monto Vitoŝa. Ĉi tie la malvarma akvo abundas, sed per ĝi oni malfacile povus estingi sian soifon.

Kun la kanto „Antaŭen marŝas ni“ ni proksimiĝas al la montodomo „Esperanto“.

Ĉu tio estas ebla? Minimume 50 gesamideanoj venis helpi por ĝia arango.

Ĉiuj kun ĝojo parolas pri la proksima seminario kiun partoprenos geesperantistoj el Sofio.

Rapide ni disdividas la laboron kaj ĉiu konsciencie kaj fervore komencas labori.

Aŭdiĝas la ritmaj frapoj de hakiloj, ŝoveliiloj, kiuj elfosas ŝtonojn, la trenado de ligno, interesaj diskutoj, ŝercaj incitoj kaj gaja rido. Birdoj traflugas timigitaj, aliaj senzorge kantas, kaj tiuj ĉi kantoj tiel profunde enpenetras en la koron, ke oni ekdeziras ankaŭ ekflugi kun ili en la vastecon.

Vere la kapreoloj kaj la cervoj ne estas inter ni por kompletigi la bildon, sed anstataŭ tio dum la vintro ili estas bonaj amikoj de la turistoj kaj akceptas nutraĵon de iliaj manoj. Sciuretoj ankaŭ malaperis timigitaj. Mi ne havas eblecon klarigi al ili, ke sur la altaj pinoj ili sentos sin pli bone.

La tempo forpasas nesenteblo.

La freŝa montara aero, la belega natura dekorado, sur kies scenejo ĉiu estas malgranda heroo per sia kontribuo por la komuna bono, donas impulson por krea utila laboro.

Niaj enmetitaj fortuloj ne estis vanaj. Ni finrikoltis grandegajn rezultojn kaj la vizaĝoj de ĉiuj brilis pro ĝojo, ke la hodiaŭan tagon ni dediĉis al la agrabla kaj la utila.

*Vesela Ivanova
Sofio — „Heroldo“*

ĈIRPAN. Je la 29-a de oktobro okazis publika kunveno de la urba komitato de la Patrolanda Fronto kaj la E-societo „Mondamikeco“. Siajn impresojn pri malproksima Japanio rakontis k-do Radoslav Triĉkov, delegito de CK de BEA en la jubilea 50-a Universala E-kongreso en Tokio.

K-do Triĉkov detale priskribis sian vojaĝon al Japanio.

La kino-salono de la gimnazio „P. K. Javorov“ estis plenplena de aŭskultantoj kiuj sekvis kun intereso la paroladon.

Lia rakonto pri la ruinaĵoj, kaŭzitaj de la atombomboj en Hiroŝima kaj Nagazaki, pri la batalo de la japanaj laboristoj kontraŭ la japanaj kapitalistoj emociis la aŭskultantojn.

Blago Dimitrov



La 25-an de oktobro p. j. okazis granda publika kunveno, organizita de la sofia E-societo „M. Gorkij“ kaj dediĉita al la solidareco de la ĉefurbaj esperantistoj kun la heroeca kaj nobla batalo de la patriota vjetnama popolo. Kara gasto estis la gazetataŝeo de Norda Vjetnamio en Sofio k-do Kamp, kiu faris porokazan prelegon kaj la ĉeestantoj multfoje aplaŭdis ĝin.

Sur la foto: k-do Kamp meze kun la floroj, apud li estas k-do N. Aleksiev, prezidanto de BEA kaj MEM.

KOLAROVGRAD. Du tagojn en la fino de novembro gastis k-do R. Triĉkov.

Kune kun la Distrikta komitato por defendo de la Paco, „Vekiĝo“ organizis tuturban kunvenon en kiu k-do Triĉkov rakontis siajn impresojn pri Japanio, pri la 50-a UK kaj pri la batalo de la japana popolo por Paco. Lia duhora parolado vekis grandan intereson kaj ankoraŭ unufoje pruvis brile la forton de Esperanto por kreado de viglaj ligoj inter la popoloj. En la kunveno ĉeestis la prezidanto de la Distrikta komitato por defendo de la paco k-do Angel Videnov, la sekretario de la urba komitato de DKMS kaj la sekretario de la Distrikta Popola Konsilantaro.

Post la parolado k-do Angel Videnov transdonis la ordenon „Kiril kaj Metodij“ — II grado al la longjara esperantisto kaj antifaŝisto Ljuben Kaŝĉiev, distingita per la ordeno konekse kun la 60-jara jubileo de la fondiĝo de nia societo.

La saman paroladon k-do Triĉkov faris plensukcese antaŭ la gelernantoj de la unua gimnazio „L. Dimitrova“.

Cvjatko Todorov

INTERNACIA ESPERANTO-SOLIDARECO

La membroj de E-societo en Tolbnĥin korespondas kun esperantistoj el ĉiuj partoj de la

terglobo. Ili konigas la sukcesojn de nia lando en la konstruado de la socialismo.

Nia esperantisto M. V. B. ricevis sciigon de sia korespondanto Willy Tittmann de urbo Karl Marx Stadt el GDR, ke je la 5. IX. 1965 j. en la urbo fondiĝos E-sekcio. La estraro de nia societo sendis gratulleteron adresitan:

Al Germana Kulturligo
Sekcio — Esperanto
D-ro Otto Nuschke-str. 6
GDR 90 Karl-Marx Stadt

kun bondeziroj por sukcesa laboro, plifortiĝo de la esperantismo, reciproka interkompreniĝo kaj proksimiĝo de la popoloj por konservo de la paco kaj internacia solidareco.

Per letero-respondo n-ro 20 je la 10. X. 1965 j. E-sekcio de KMS dankis pri la farita de ni utila laboro kaj bondeziras al ni sukceson.

Jen ekzemplo por reciproka helpo kaj internacia E-solidareco.

Slavĉo Sp. Ŝijakov

JAMBOL. Kun celo propagandi Esperanton inter la filatelistoj kaj la filatelon inter la esperantistoj, en la urba filatela ekspozicio oni eksponis kelkajn tabulojn de malnovaj esperantaj leteroj — ĉefe il. poŝtkartoj. Ĉiuj eksponaĵoj estas datitaj 1900—1905 — t. e. antaŭ pli ol 60 jaroj — kaj devenas el multaj landoj de la mondo: Aŭstrio-Hungario (Boĥemio kaj Moravio), Belgio, Britio, Germanio, Italio, Kanado, Norvegio, Portugalio, Ruslando, Svedio, Usono, Viktorio (Aŭstralio) k. a. Sur apartaj tabuloj estis eksponitaj multnombraj leteroj devenintaj el Ruslando, Francio, Boĥemio kaj Moravio.

Inter la leteroj iuj estas devenintaj de A. Zarnudnij — il. pk. datumita la 19/6. XII. 1900 — esperantisto n-ro 4981* el Ŝvenkŝni, Ruslando, de Ek. Nik. Dadaŝeva — il. pk. datumita la 18. III. 1903, esperantistino n-ro 5197 el Baku, Ruslando; el Boĥemio kaj Moravio — esp. 5810; de L. Larose — il. pk. de 22. XI. 1903, esperantisto n-ro 7564 el Kanado; de Jon Swire, esperantisto n-ro 8282 el Britio, de esperantisto n-ro 8302 el Francio k. a.

I. a., estis il. pk. de R. H. Geoghegan. Kiel oni scias, Geoghegan proponis kaj Zamenhof akceptis la ideon, ke la esperanta stelo estu verdkolora.

La eksponitaj esperantaj korespondaĵoj estas parto de la tiama korespondado de esperantisto n-ro 4774 Penko Petrov el Jambol, kies nomon oni povus trovi en Esperanto-jarlibro 1911, ankaŭ en Esperanto-jarlibro 1965, paĝo 123.

La ekspozicio daŭris de 24. IX ĝis 3. X. 1965. Ĝi atingis grandan sukceson — estis vizitita de iom pli ol 35000 vizitantoj.

P.

* N-ro en la Monda registaro (Adresaro) de esperantistoj de L. L. Zamenhof.

ЕСПЕРАНТО СЕ ИЗУЧАВА ОТ СОФИЙСКИ ДЕЦА

Софийският квартал „Триъгълника“ се населява предимно от семейства на ж. п. служители. В квартала е живял и героят партизанин-есперантист Стилиян Пешев, загинал за народната свобода.

Преди няколко години Йорданка Козачева, учителка, в памет на героя Ст. Пешев ръководи в кварталното читалище двегодишен ученически есперантски курс. 14 ученици от III до VII класове издържаха изпит за средно владеене на езика.



Учителката Козачева с ценното съдействие на директорката на кварталното училище „Димитър Благоев“ др. Кънева и зам. директора др. Върбанов, съгласно препоръката на Отдел „Народна просвета“ при СГНС организира ученически кръжок по есперанто за учениците от III-те и IV-тите класове при училището, общо 57 ученика.

На откриването присъства председателят на Софийското есперантско д-во „М. Горки“ др. Н. Нанов, представителят на учителската есперантска секция Люб. Марикин и др.

Кръжокът започна и продължава занятията си. Интересът е голям. Преподава се по директната метода. На малките бъдещи есперантисти пожелаваме успешно изучаване на езика под ръководството на преподавателката Козачева.

К.

AJTOS. La 26-an de novembro 1965 j. okazis la jarkunveno de la E-societo. Oni elektis novan estraron kun prezidanto D-ro Ĉanko Ĉanëv, la ĉefo de la kontraŭtuberkuloza dispensario en la urbo.

Oni antaŭvidis diversajn entreprenojn

La kurso por lernado de la lingvo komencis sian laboron. Kursgvidanto k-do G. Lazarov.

K. Paspalev

65-JARA ESPERANTO-JUBILEO DE K-DO PENKO PETROV

Antaŭ nelonge la membroj de E-societo „Maksim Gorkij“ havis kortuŝan solenaĵon — celebradon de sia membro-veterano Penko Petrov. Krom la multnombraj sofiaj geesperantistoj la solenaĵon ĉeestis ankaŭ granda grupo da junaj jugoslaviaj esperantistoj el urbo Svetozarevo, ĉefe kun sia gvidantino s-ino Duŝica Dodiĉ. Pri la vivo kaj Esperanto-agado de k-do Petrov parolis k-do Kunĉo Vălev, vicprezidanto de societo „M. Gorkij“.



Longa kaj edifa estas la vivvojo de la jubileulo. Naskita en 1880 j. en la sudbulgara urbo Jambol, li jam en 1900 j. konatiĝis kun Esperanto kaj 65 jarojn restis fidela kaj sindona batalanto por ĝia triumfo. Samtempe li aliĝis al la ideoj de la socialismo. Tre bone k-do Petrov uzis Esperanton por la batalo de la bulgaraj socialistoj kaj de sia patrolando. Speciale fruktodona estis lia korespondado kun la rusa esperantistino Ana Ŝelenberg el urbo Voroneĵ. En unu el siaj leteroj Ŝelenberg priskribas unuajn ribelojn de la rusa proletaro en 1905 j. Petrov tuj tradukis la leteron kaj ĝi estis publikigita en „Rabotniĉeski Vestnik“ (n-ro 23/1905 j.). K-do Petrov korespondis ankaŭ kun elstaraj tiamaĵ esperantistoj, kiel Harold Bolinbroke — la unua prezidanto de UEA, Alfred Micheau — la prezidanto de la unua E.-kongreso en Boulogne-sur-mer k. a. Speciale kara por ni kiel bulgaraj esperantistoj estas la konservitaj leteroj de la rusa esperantisto Aleksej Al. Zarudnij, kun kiu k-do Petrov ankaŭ korespondis. En unu el siaj leteroj Zarudnij skribas, ke li konas kaj forte amas Bulgarion, ĉar li vizitis ĝin, par-

topreninte la gloran liberigan militon kontraŭ Turkio en 1877—78 j.

